

La Esperanto-Gironde Informilo

MARTO 2024

N° 174

Varmaj kunvenoj





Korvarma ZAZA-tago 2023 de Esperanto-Gironde kaj GEME en St-Genès-de-Lombaud sabaton, la 9an de decembro 2023

Spite al griza vetero (ĉu vintra?), spite al gripoj kaj nazkataroj, kiuj lastminute malebligis al pluraj el ni partopreni en la jarfina kunveno de geesperantistoj en Ĝirondio, dekdu personoj malferme interŝanĝis laŭ invito de nove kreita *Groupe Entre-2-Mers Esperanto (GEME)* en la hejmo de la familio Warnier.

Iberla, Jean-François, Thibault (14-jara) kaj Thimoté (12-jara) varme bonvenigis nin ekde la 10a30 per kuketoj kun kaf- kaj te-tasoj. Ĝoje retrovis sin tie krom niaj gastigantoj Elvezio, ĴanSeb kaj Annie, Dominiko, Fernando, Luca, Klodin' kaj Marcelo. Senkulpigis Janine, Yannick, Lucienne, Rose, Bernard, Gloria, Hervé, Joël, Olivier, Eric, Jean-François, Karima, Roméo, Vincent, Monique.

Post interkonatiĝaj babiladoj, sidinte ĉirkaŭ la familia tablo, ĉiu siavice sin prezentis kaj indas gratuli ĉiujn komencantojn, kiuj klopodis paroli en Esperanto!

Iberla, kiu originas el Argentino, tre simpatie komfortigis ĉiujn. Ŝi energi-plene parolis. Ŝi rakontis pri siaj multaj okupoj kaj diverslokaj laborpostenoj. Nun ŝi instruas la hispanan lingvon. Ŝia ĝojo radias, ankaŭ dum ŝi bele kantas.

Jean-François, emerito, muzikanto, ludas klarneton. Li pasiigis pri fotarto. Se li kiel junulo en Strasburgo iam eklernis Esperanton, li remalkovris ĝin en la lernejo de siaj infanoj dank' al Morine. Jean-François prezentis GEME. Morine, transloĝiginte en Bretonion, postlasis senkapan Esperanto-grupon de Créon. Kaj sekve Iberla kaj Jean-François instigis interesatojn daŭrigi la kontaktojn por plulerni la lingvon. Pro praktikaj kialoj (ebleco senpage rezervi vilaĝan kunvenejon) la asocio ŝanĝis sian nomon kaj sidejon... Sed ĉu Esperanto-Gironde ĝuste ne same decidis? Elvezio informis pri la oficialigo de la modifo de la sidejo en Pesakon, post malfacilaĵoj en la prefektejo.

Jean-François montras al ni *gemesperanto.blogpost.com*, la blogon de GEME, kiun li kreis per tekstoj el la retejo de Esperanto-Créon kreita de Morine. Li ankaŭ montras la elektronikajn sliparojn, kreitajn per la programo Anki, kiu helpas al lernantoj lude parkeri vortojn kaj ties signifojn. Jen France/Esperante, jen inverse Esperante/France.

Mirinda estas ankaŭ Thibault, kiu diras sin scivolema, mi eĉ dirus sciavida! Tiu junulo ŝatas lingvojn kaj historion, historiajn anekdotojn. Multifaceta talentulo, li ludas plurajn instrumentojn. Nuntempe violonĉelon kaj pianon. Li ankaŭ kapablas klarneton kaj provas ludante komponi divers-stilajn muzikojn per komputilo: "Tangon, ĵazon kaj ĉion alian..."

Jen artista familio, kiu kelkatempe vivis en Galegio, tiu nordokcidenta regiono de Hispanio, kie la loka lingvo estas proksima al la portugala... jen cetera ligilo inter ili, kun Dominiko kaj Fernando!

Kaj ĝuste kiam Fernando anoncis, ke li naskiĝis en vilaĝo apud Porto, oportune venis la informo pri la venontsomera SAT-kongreso tie.

Elvezio anoncis la feston de la lingvoj en la universitato en marto. Ni preparu nin por animi budon, eble prelegon.

Kiel kutime komuna dispartigo de manĝaĵoj igas la piknikon bankedo. Abundaj bongustaĵoj!

Posttagmeze venis distra tempo. Marcelo prezentis originon de Esperanto-simboloj: la verdaj stelo kaj flago. Lude ni korektas leteron de Maurice Duchochois, komencanto en 1904. Mirinde estas konstati la kapablon skribi post nur unu-monata lernado.



Sekve bonhumore *harmoniis* kantado. Jean-Seb kunportis la afiŝon de la Eŭropa Himno. Estis klarigite, kiel ĝi estas uzita dum la unua kurso en la universitato.

Tiam Jean-François kaj Luca improvize akompanis ludante klarineton kaj gitaron. La dua kanto *La espero* «En la mondo venis nova sento...» estis kiel «karaokeo».



Notinde, ankaŭ la tri katoj de la domo jam bone familiariĝis kun Esperanto. Ili regule venis inter ni, pacience kaj atente aŭskultis klarigojn kaj kantojn. Tamen eblas pensi, ke la plej ŝatinda momento por ili estis, kiam oni disdonis desertojn. Tiam ili rajtis gustumi iom da kirlita kremo!



Evidente, la programo finiĝis kantante «Tuj la kompanar'».

Je la 16a30 jam venis tempo por adiaŭi. Griza vetero kaj pluvo ne ĉesis. Kuraguloj tamen decidis promenigi siajn ombrelojn sub pluvo kun intenco viziti la preĝejon de la vilaĝo.

Tempo rapide pasis. Ĉiu esperas denovan renkontiĝon en amikeca rondo.

Raportis Klodin' kaj Marcelo

LUDO



Al vi novaĵojn bonajn ni desiras
Ke agadojn viajn sekvaĵu sukcese :
Verbu multajn aliajn : plie, ni esperas
Ke vi nepre estos an nia Kongreso.

29 Decembro 1904

Kara Signoro

Societaroj esperantistaj, Desirantoj
Korespondi esperante povas eĉi al
mi kelkajn vortojn en poŝtkarto
kun lia adreso, mi respondoos plej urege
al li - mi komencis lerni esperantan
lingvon de unua monato, mi demandoos
al vi pardonu miajn erarojn
Kun Dankigojn Koran saluton

Maurice Duchochois
64 Strato Moulin à l'Espere
Boulogne sur mer
(Franso)

LETERO DE MAURICE DUCHOCHOIS



- Ĉu vi bonvolas korekti la lingvajn erarojn en la teksto de la letero verkita de komencanto?

FOTOALBUMO DE LA ZAMENHOF-TAGO





ESPERANTO-GIRONDE

KUNVENO en Maison de quartier Pessac Bourg en PESSAC

la 21an de januaro 2024

de la 10a30 ĝis la 16a

Ceestas: Ĵanseb Brilleaud, Luca Buselli, Elvezio Canonica, Janine kaj Yannick Dumoulin, Gloria Gargallo, Hervé Giranton, Katya Gradzion, Olivier Moreno, Klodin' Pomiroł, Marcelo Redoulez.

Senkulpigataj: Joël Lajus, Lucienne Laroche, Dominiko Martins, Bernardo kaj Rose Sarlandie, Eric Tiffon.

Elvezio bonvenigas ĉiujn.

1/ Adreso de la sidejo de Esperanto-Gironde

Elvezio: Nun la oficiala sidejo estas ĉe la adreso de la prezidanto, do en Pesako. Tiel ni rajtas senpage disponi pri urba salono. Oni devas peti unu monaton antaŭe.



2/ Financoj

Yannick: Ni malfermis novan bankokonton en Crédit Agricole de Montendre. Nun la konto estas aktiva kaj ni havas ĉekujon. Mi nutris la konton per 110 € de la aliĝoj.

La sekvo estas fermi la antaŭan konton

en Bordojo, kie estas tri kontoj:

- ĉekkonto, sur kiu restas 2631,33 €
- ŝparkonto (Livret A) kun 3187,67 €
- societaj akcioj (parts sociales): 30€

Mi opinias, ke almenaŭ dum kelka tempo ne necesas fermi la ŝparkonton. Ni informiĝos pri la societaj akcioj.

Restas: 83,20 € sur la montendra konto + 100 € en monbiletoj.

Sume: 6032,19 €

Klodin': Jen pliaj 15 € de la grupo GEME kaj monbiletoj por 2 kanzonlibroj. Restas iomete pli ol 20 libroj.

Yannick: Ĝis nun nur 8 aliĝoj: 3 paroj kaj 2 individuoj.

3/ Pri Brassens

Yannick: La unua kontakto kun Universal kaj Warner okazis fine de 2019. Ni celis publikigi la libron en 2021, por la 100jariĝo de Brassens. Mi solvis la aferon kun Universal en novembro 2022, kaj finfine pagis la rajtojn en 2023 al Warner.

Sed Warner informis, ke por la du poemoj de Paul Fort en la libro, havas la rajtojn ne Warner sed Flammarion. Do mi kontaktis Flammarion kaj finfine alvenis propono de Flammarion: 50 € por la du poemoj. Post traktado, la responsulino konsentis malaltigi la prezon ĝis 30€. La kontrakto devus baldaŭ alveni.

Klodin': Kion pri *Ulyse*? La svisa eldonejo Hortensia diris antaŭ pluraj monatoj al Martine, ke ĝi same faros, kiel la internaciaj firmaoj.

Marcelo: Necesos aldoni kopirajton de Flammarion sur la libroj.

Yannick: Ni povus lanĉi la presadon kun la rajtigo de eldonejo Hortensia, kaj ni pagos ĝin poste.

Cetere Martine transsendis retan proponon de eldonisto kun kelkaj tarifoj. Ni devos sendi unu ekzempleron al Universal, du al Warner, unu al Flammarion + laŭleĝa depono.

Mendis 300 kalendaretojn al Espéranto-France. Eble oni povus malfermi Paypal-konton, kiu ebligas rete pagi.

Voĉdonado por la malfermo de Paypal-konto:
Unuanima aprobo

4/ Aliaj aferoj

Elvezio: Iom post iom ĉiuj numeroj de LEGI estos disponeblaj ĉe la reto.

Universitataj kursoj rekomenciĝis: perreta laboro kun Hervé, Jean-François, Luca, Roméo.

Klodin': Mesaĝo de viro el Gradignan (Francis Clarac), kiu volis trovi Michel Lavergne. Mi invitis lin partopreni en nia kunveno.

Elvezio: En Le Petit Grain. Estos babilrondo venontan ĵaŭdon je la 18a.

Hervé: La unua jam okazis, en kiu partoprenis 4 homoj el Espéranto-Gironde. Iu alia homo venis kaj interesiĝis.

Marcelo: Hieraŭ ni partoprenis en la kurso de GEME. Mi prezentis mian ĉeeston, kiel spronon. Ni laboris per *Gerda* (8a leciono). Poste ni rigardis la paĝojn de la lasta LEGI pri Tinĉjo. Ĉeestis Iberla, Jean-François, Thibault, Vincent (kasisto). Ili estas interesataj kaj volas lerni. Ili faru la ekzercojn pri *Gerda* kaj estos alia renkontiĝo post unu monato. Iberla sendis raporteton por venonta LEGI, helpe de aŭtomata tradukilo. Janine aldonos la korektaĵojn, pedagogicele.

Vincent estas ilustristo. Fine de la kunveno, li proponis, ke mi korektu tradukon, kiun li faris por ĝin publikigi. Li bonvolos ilustrati miajn tekstojn.



Klodin': Novaĵojn pri Monique: Ŝi estis operaciita pri la kokso en oktobro. Cetere ŝi ne plu povas uzi la programon «Ek» kaj petas helpon.

Yannick: Sendos al ŝi ligilon.

Marcelo: De la 8a ĝis la 11a de majo okazos en Strasburgo Eŭropa Kongreso. Sufiĉe multaj asocioj el pluraj landoj kuniĝos (pli ol 200 homoj jam aliĝis). Partoprenos Klodin', Marcelo, Ge-Sarlandie.

Yannick: Eble la SAT-Amikara kongreso okazos en Kvinpetalo (20 ĝis 30 partoprenantoj).

Marcelo: La SAT-Kongreso okazos en Porto de la 4a ĝis la 11a de aŭgusto, bedaŭrinde samtempe, kiel la UEA-Kongreso.

Jean-Seb: Pri EDE: Eŭropa baloto en junio. Esperantistoj prezentos kandidatojn. Jam ekzistas diskutlisto. Ili celas printigi balotilojn, manifestojn (professions de foi) kaj prezenton de Esperanto. La afiŝoj ne jam estas pretaj. La moto estas: «Esperanto, justa lingvo por Eŭropo»; ili celas la adopton de Esperanto en ĉiuj lernejoj de Eŭropo, kaj de la eŭropa himno en Esperanto.

Yannick: Mi povas donaci al kiu volas la metodon *Mazi en Gondolando* por infanoj (sed uzeblan ankaŭ por plenkreskuloj): VHS, KD, ekzercoj. Temas pri desegnofilmo, origine lingvokurso de la BBC por instrui la anglan; poste ĝi estis uzata por aliaj lingvoj.

La kunveno finiĝas je la 12a15.

Post la manĝo Marcelo prezentas bildaron pri la temo «Kiel franclingva ŝlagro iĝis sudkorea himno al libereco kaj demokratio».

Temas pri la kanzono de Michel Polnareff *Qui a tué Grand-Maman ?* (1971). Michel Polnareff estis tiutempe tre fama en Suda Koreio. (vd. La artikolon de Marcelo p.9)

Fine de la prezentado, ni kunkantas la esperantigitan version de la kanto.

Janine

La venonta kunveno okazos la 10an de marto.

La Ĝenerala Asembleo okazos la 7an de aprilo.

Ambaŭ en la en Maison de quartier Pessac Bourg, 28 Avenue Roger Cohé en Pessac.



Kiel franclingva ŝlagro iĝis korea himno al libereco kaj demokratio

Publikigita en 1971 sur la albumo "Polnareff's", registrita en Londono, *Qui a tué Grand-maman ?* (*Kiu mortigis Anjon?*) estas barokpopa kanzono iom solena. Michel Polnareff tiam glore staris je apogeo de sia famo. Jam for estis la bohemiaj jaroj, kiam la eksterordinara kantisto almoze ludis en metrostacioj aŭ sur la strato. Sed komence de la 70-aj jaroj, Polnareff travivis malkomfortajn tempojn: li malfacile refortiĝas post atako dum koncerto kaj ne sukcesas supervivi la morton de sia amiko Lucien Morisse. Ĉi lasta estis alta figuro en la muzikmondo kaj ĉe la nacia radiostacio *Europe1*, programisto, direktoro de la diska firmao *Disc'AZ* (la eldonejo de Polnareff), kaj unua edzo de la kantistino Dalida. Li mortigis sin la antaŭan jaron.



Kiu mortigis anjon? estis dediĉita al li. La romantikema Michel Polnareff, vundita konstatante, ke la socio iĝas ĉiam pli avida kaj pli superflua, nostalgie prikantas la antaŭan tempon, tiun langvorecan kaj reveman. Ĉi tiun odon al kara sed forpasinta epoko reliefigas riĉa instrumentaro, kiu inkluzivas pianon, frotitajn kordojn, tamburinojn, kaj precipe koruson, kiu donas al ĝi kvazaŭ sakran karakteron.

Neatendita revigliĝo... en Sud-Koreio



En 1980, la kanto spertis neantaŭviditan revigliĝon en lando, kie Michel Polnareff estas tre populara: Sud-Koreio. *Kiu mortigis Anjon?* estis larĝe elsendita ĉe la radio dum la Gŭangju-ribeło, grandega socia kaj demokratia movado ekflorinta. La ribelo estis severe subpremita far la fortoj de la aŭtoritata reĝimo. Tamen la manifestaciantoj forte rezistis kaj uzis la melodion de la franca ŝlagro, kaj ŝanĝinte la vortojn, kreis la kanzonon "*La kanto de majo*", himno de tiu ribelo.

오월의노래 – La kanto de majo -

Sur Geŭmnam-ro ŝprucis la sang', jen petalar' de ruĝa flor',
Ve! Via brust' kiel tofu' estas tranĉita belec' for.
Kiam revenas la maja tag', la sang', ruĝa flu', en kor' bolas plu.

Kial ĉi paf'? Kial ponard'? Kien forportis kamion'?
En Mangŭol-dong okulojn mil sange vualis venĝbezon'
Kiam revenas la maja tag', la sang', ruĝa flu', en kor' bolas plu.

Kuniĝu ni, eliru ni, gekamaradoj vivaj pli
Ĉu povas ni vivi sen lukt' tra insultita histori'?
Kiam revenas la maja tag', la sang', ruĝa flu', en kor' bolas plu.

Fia kalvul', aŭ japanaĉ', alte nazeĝa fijanki',
Foriru tuj! Ni zorgos mem pri voj' de nia histori'.
Kiam revenas la maja tag', la sang', ruĝa flu', en kor' bolas plu.
Kiam revenas la maja tag', la sang', ruĝa flu', en kor' sang', sang', sang'!



Paz



Kyina

Tiu adapto rezultas de kunlaboro inter Paz – kromnomo de JUNG Hyunsoo, kiu laŭvorte tradukis la korean tekston kaj CHOI Kyina, kiu plibonigis la versojn de Marcelo.

Klarigaj komentoj pri la ribela teksto

La dua verso de la kantoteksto, laŭvorte tradukebla per *Tranĉitaj kiel tofuo estas viaj belaj mamoj* aludas la vivfinon de Son Ok-rye, kiu estis tiutempe mortigita fare de armeaj fortoj. Filino Ok-rye, ŝi mortis pro pikvundo al maldekstra brusto, pafvundo al dekstra brusto, pafvundo al la makzelo, pafvundo al maldekstra pelvo, penetra pafvundo al la femuro, kaj penetranta pafvundo al la dekstra brusto. Tio signifas, ke ŝi mortis kvin foje trafita de pafoj de armeaj trupoj kaj sufero de ŝiaj mamoj forŝiritaj per bajoneto.



La unua verso mencias Geŭnmam-ro. Temas pri la tradicia centra vojo en la ekzistanta centro de Gŭangŭ, urbo kun 1,4 M da enloĝantoj, sude de Sud-Koreio. Tie ekis la popola ribelo.



Kio okazis inter la 18a kaj 27a de majo 1980 en Sud-Koreio?

La ekribelo de Gŭangŭ komenciĝis meze de majo 1980. Miloj da gestudentoj invadis la stratojn de Seulo kaj aliaj grandaj urboj por denunci la entrudiĝon de la armeo en la ŝtatan politikon.

En ses semajnoj la generalo CHUN Doo Hwan sukcesis regi la armeon kaj decideme montris sian pretecon transpreni la povon super la lando. Sed neaten-dite kaj konsternige por la CIA kaj la ŝtatoficoj, gestudentoj, gelaboristoj kaj opo-nantaj politikistoj provis blokadi la sud-korean armeon per surstrataj manifestacioj kun rektaj alvokoj al Usono.

La 17an de majo



La prezidanto generalo CHUN ricevas la anoncon, ke Vaŝingtono ne kontraŭus armean subpremon de la ribelantoj. CHUN interrompas la demokratiigon de la lando proklamante militan leĝaron kaj sendante soldatojn en urbojn kaj kampusojn, por aresti ĉefojn de la ribelo.

La represio efikis en Seulo kaj multaj urboj. Tamen ne en Ĝuangĵu, fama pro sia rezistemo fronte al centrala kaj aŭtoritata reĝimo. Tie studentoj defias la armeon.



La 18an de majo

La komandantoj de la armeo estis intence mensoge informitaj, ke «komunista revolucio subtenata de Nord-Koreio komenciĝis tie». Tamen tute ne veras, ke Nord-Koreio manipulis la popolveiĝon en Ĝuangĵu. Sed tiu argumento trompis la popolon, por pli efike subpremi la demokratian movadon. Kaj la trupoj de CHUN komencis dutagan detruadon, disrabadon tra la tuta urbo. Ne temis pri ordinaraj trupoj de la armeo, sed speciale trejnitaj por mortigi nord-koreojn. Taglume la paraŝutistoj ekfrapis, bajonetis, pafis kiujn ajn kontraŭstarantojn, sed ankaŭ ordinarajn pasantojn, persekutante ilin ĝis interne de ilia hejmo. Viroj el Ĝuangĵu ekreagis kaj formis milicojn por rebati.

Periodo de la 18a ĝis 27a de majo

Tiam komenciĝis semajno, kiam organiziĝis kolektivaj dispartigoj dank' al civitana solidareco. Kelkaj aktivuloj kaj historiistoj senhezite komparas tiun tempon kun la Pariza Komuno. La Ĝuangĵuanoj esperis, ke Carter kaj la usona administracio, publike defendantoj de la homaj rajtoj, subtenas ilin. Rumoroj eĉ asertis, ke survojis poraviadila militŝipo tiucele. Sed Vaŝingtono naŭziĝis de tiuj eventoj. Jam 40.000 usonaj soldatoj staris tie kun atomarmiloj pro la tiam, drasta, malvarma milito.



La 22an de majo Usono findecidis permesi al CHUN deploji siajn trupojn sub uson-korea komandado por subpremi la ribelon. Kelkajn horojn poste la trupoj de CHUN ekmarŝis kontraŭ Ĝuangĵuon kaj ĉiuflanke atakis. Konsilio de civitanoj de Ĝuangĵu petis de la usona ambasadoro William Gleysteen, intervenon por negoci pacotempon. Sed lia ofico malvarme forĵetis la peton.

Frumatene la 27an de majo la koreaj trupoj penetris en la provincan ĉefurbon kaj rapide ĉesigis la rezistadon, fermis la Komunon kaj arestis centojn da partoprenintoj.



La tombejo de Mangŭol-dong: amas-kadavrejo

En la unuan tombejon estis transportitaj per ĉaroj aŭ purigaj kamionoj la korpoj de la viktimoj.



La tombejo 5.18 de Mangŭol-dong

En 1997 estis decidite honorigi la mortintojn. Por eniri en la novan tombejon necesas paŝi sub la pordego de la demokratio. La kvarmetrojn alta Memorturo simbolas preĝantajn manojn.

La 18a de majo estiĝis nacia memortago.

Internaciaj sekvoj: la rilatoj Sud-Koreio / Usono

En junio la teamo de Carter aprobis monprunton kaj Sud-Koreio aĉetis usonan nuklean teknologion. En septembro 1980 CHUN estis prezidanto kaj en januaro 1981 la nova usona prezidanto Donald Reagan elektis CHUN, kiel unuan eksterlandan oficialulon, en la Blanka Domo. La rilatoj Usono / Koreio restabiliĝis kaj krizo estis evitita.

Sed rilate la popolon?

La ekkontrolo de CHUN komencis okjaran militistan regnon. Samtempe, dum la periodo de ĉiuj 1980aj jaroj, disvolviĝis luktado por demokratio, kun kulmino

en la jaro 1987 dank' al gigantaj manifestacioj en Seulo kaj aliaj urboj. Milionoj da homoj surstrate manifestaciis dum multaj semajnoj.

En 1997 la movado atingis apogeon, kiam KIM Dea Jung estis elektita prezidanto de Sud-Koreio. Li originis el Gŭangju kaj estis delonge disidento.



La melodio de Michel Polnareff iĝis marŝo kaj la aŭtoro de la ribela teksto restas anonima. Sed laŭlonge de la ribelaj tempoj, kaj plu hodiaŭ dum memortagoj, la *Kanto de majo* estas kunkantita kun granda emocio.

<https://www.youtube.com/watch?v=m9JeQXgUUhU>

Maja kanzono ²

Kuntradukis Paz JUNG Hyunsoo kaj CHOI Kyina – versigis Marcelo REDULEZ



- | | | |
|---------------------------------------|---------------------|-----------------|
| 1. -Sur Geŭmnam-ro ŝpru-cis la sang', | jen petalar' de | ru - ĝa flor' |
| 2. Ki - al ĉi paŝ'? Ki - -al ponard'? | Ki - en forpor -tis | ka - mi - on'? |
| 3. Kun -i-ĝu ni, el -i-ru ni, | ge - kama-ra - doj | vi - vaj pli |
| 4. Fi - a kalvul', aŭ japanaĉ', | al - te naz-e - ĝa | fi - jan - ki', |



- | | | |
|---------------------------------------------------|--------------------|-----------------|
| Ve! Via Brust' ki - el to-fu' es -tas tranĉi - ta | be - lec' for. | |
| En Mangŭol-dong o-kulojn mil | san-ge vu-a - lis | venĝ-be-zon' |
| Ĉu povas ni vi - vi sen lukt' | tra in-sul-ti - ta | his - to - ri'? |
| For-i-ru tuj! Ni zorgos mem | pri voj' de ni - a | his - to - ri'. |



- Ki - am revenas la maja tag', la sang', ruĝa flu', en kor' bolas plu.



Marcelo

LA ESPERANTO MUZEO EN VIENO.

Lastan novembron, ni pasigis tri tagojn en la ĉefurbo de Aŭstrio kaj decidis viziti la famkonatan Muzeon pri Esperanto. Ni pensis, ke ni facile trovos ĝin. Tute ne!

Ĝi staras en la kvarteaŭo, kie sidas pluraj palacoj, sed ĝia nomo aperas ne-nie. Fakte ĝi estas parto de la Nacia Biblioteko. Do petinte la lokon de iu hotelpor-disto sur la sama vojo, ni eniris tra granda pordego en tiun Herrengasse.

Kompreneble, por aĉeti la biletojn mi parolis en nia komuna lingvo. Grava eraro! La dungitino ne parolis Esperanton; ĉar mi ne pripensis antaŭe en la germana, mi uzis la anglan.

Finfine ni eniris la tiel nomatan «Esperantomuseum». Fakte estas nur koridoro, en kiu estas pluraj ekranoj, kiuj montras plurajn aspektojn de la historio de la lingvoj. Plie, kelkaj afiŝoj ornamas la murojn, kaj en vitrinoj objektoj pli malpli malnovaj estas lokitaj. Mi pensas, ke nia grupo *Esperanto-Gironde* povas starigi muzeon, kiu almenaŭ egalos la vianan. Mankas nur loko!

Bernardo k. Rose




DU SIONISME À L'UNIVERSALISME :
L.-L. ZAMENHOF
Robert Lloancy

Collection : Logiques politiques

Thématique :

- Religions et spiritualités > Judaïsme et monde juif
- Sciences politiques et Politique > Histoire des idées politiques et régimes politiques
- Histoire



« Je suis juif... si je n'avais pas été un Juif du ghetto, l'idée de l'unification de l'humanité ne me serait jamais venue à l'esprit ». Ainsi s'exprimait en 1905 Louis-Lazare Zamenhof. Cela l'amena, dès le début des années 1880, à une activité sioniste. Pourtant, au fil des ans, il révisa ses convictions. En 1901, il proposa comme solution d'unification du peuple juif, l'hillélisme, en référence au sage rabbin antique, Hillel. Ainsi, il rejoignait les critiques de Bernard Lazare, grand défenseur d'Alfred Dreyfus. Pour les deux auteurs, il s'agissait de parvenir à un réel universalisme en échappant à la tentation du nationalisme inévitable pour le sionisme. Vers la fin de sa vie, Zamenhof, plus nuancé, concèdera : « Il est vrai que le nationalisme des peuples opprimés est bien plus excusable que le nationalisme des peuples oppresseurs ». Pourtant, même là, le penchant vers le nationalisme est toujours prêt à s'éveiller. Il anticipe, ainsi, les critiques de Yechayahou Leibovitz, à l'égard du sionisme.

Date de publication : 9 novembre 2023

Broché - format : 15,5 x 24 cm • 226 pages

Langue : français

ISBN : 978-2-336-41724-0 / EAN13 : 9782336417240 / EAN PDF : 9782336417257

<https://www.editions-harmattan.fr/livre-du-sionisme-a-l-universalisme-l-l-zamenhof-robert-lloancy-9782336417240-78341.html>



AKIRINDA LIBRO!

Robert Lloancy, licencié en philosophie, titulaire d'une maîtrise d'enseignement, a enseigné cette discipline, en Tunisie d'abord (École normale de Sfax, et lycée du Bardo à Tunis), puis à Bayonne (lycée René Cassin). Retraité de l'Éducation nationale, il est l'auteur, chez L'Harmattan, de deux autres ouvrages : *La notion de sacré : aperçu critique* (2008) et *James Cook et le tabou : origine d'une notion* (2015).

Roberto estas delonga valorega amiko de la Paŭa grupo. Liaj rilatoj kun Esperanto-Gironde jam ekzistis en la komenco de la 1980aj jaroj.

Por iom pli bone koni Roberton, ne hezitu spekti la 2-minutan filmeton, klakante sur la ĉi postan ligilon:


<https://www.larepubliquedespyrenees.fr/culture-et-loisirs/livres/zamenhof-un-juif-du-ghetto-a-la-vision-universelle-17791323.php>

Artikolo el la gazeto *L'indépendant*:

Les Rendez-vous de Saint-Estève, dans le cadre des CEPS (Cours d'éducation populaire stéphanois) et parrainés par Dom Brial, ont proposé une conférence de Robert Lloancy. Il a découvert l'espéranto au lycée Arago de Perpignan dans les années 1960.

Il a dernièrement proposé une conférence sur cette langue au théâtre de l'Etang. (...)

Après avoir développé son historique et sa composition, Robert Lloancy a offert au public une courte leçon d'espéranto qui a été appréciée. À la suite de ce rendez-vous, un débat s'est instauré entre le public et le conférencier.



<https://www.lindependant.fr/2018/12/24/lesperanto-fait-ses-premiers-pas-au-theatre-de-letang,5994368.php>

Marcelo

PACO–OAZO en ISRAELO

Mi verkas tiun tekston post legado de artikolo aperinta antaŭ kelkaj semajnoj en la semajna revuo «La Vie». Temas pri tre speciala israela vilaĝo, kies nomo estas Neve Shalom en la hebrea lingvo kaj Wahat al Salam en la araba; Paco-Oazo en la nia!



En tiu vilaĝo, kiu situas samdistance inter Tel-Avivo kaj Ĵeruzalemo, kunvivas harmonie centoj da familioj, judaj kaj arabaj; tre malofta fakto en Israelo/Palestino! Tie la esprimado estas libera kaj la infanoj, dulingvaj, vizitas la saman lernejon. Nek sinagogo, nek moskeo staras en tiu loko, nur komuna spirita salono.

Kiam restas neokupata domo, speciala komitato prezentas al akceptotaj familioj la moralan mision de la komunumo: «Ĉi-tie ni laŭdigas la konon de la aliaj, empatian kaj solidarecon. Konstrui pacon, egalecon kaj dignon inter la du partoj estas nia fako», diras unu el la fondintoj de la vilaĝo. Sed nuntempe estas malfacile, ĉar de la 7a de oktobro, ankaŭ la vilaĝo suferas pro la dividoj, kiuj regas en la lando. Ĉiutage la loĝantoj vidas militajn aviadilojn kaj ankaŭ aŭdas falantajn bombojn; kelkaj perdis proksimulojn en atakitaj sudaj kibucoj aŭ en Gaza-teritorio .

Por superi siajn angorojn, ili malfermis parolo-spacojn, unue interne de la komunumo, sed poste ankaŭ eksteraj personoj rajtis partopreni por esprimi siajn sentojn.


Tiuj homoj, tamen, kutimas suferi pro netrankvileco. Ekde la komenco, tiu vivloko, minoritata en la lando, ne estis agnoskata de la israela ŝtato. Perfortaj atakoj okazas. En la 2020a jaro, incendio detruis la lernejon; la kulpantoj oni ankoraŭ ne trovis!

Ekde la 7a de oktobro, paroli pri paco kaj reamikiĝo povas esti danĝere. La judaj kaj arabaj civitanoj, kiuj montras sian apogon al palestinanoj de Gaza, riskas esti arestitaj aŭ maldungitaj. La israela armeo starigis militkomunikadon, kiu ne permesas nuancon. La gazetaro, unuvoĉe, subtenas la militon. Ili tute ignoras la laboron de la pacbatalantoj. Venĝemo estas la ĉefa temo. Por la palestinaj civitanoj de Israelo, tiu venĝemo nepre estas konkreta; ili ofte suferas pro fizikaj, naciismaj kaj rasismaj atakoj. «Mi ege timas, kiam mi devas eliri por trabutiki; kiel arabi-ni mi endanĝerigas min», diras la propranolantino de la komunumo.

Konklude, la lernejestro de la paco-lernejo konfesas: «Kiam ni rigardas tion, kio okazas ĉirkaŭ ni, ni devas konstati ke ni malsukcesis. Tamen, ni volas montri que la paco-ideo restas atingebla eĉ se ĝi estas malfacila.»

Kune kun li, ni geesperantistoj, kies misio estas esperi kaj persisti, esperu ke paco, iun tagon, superfortos en tiu parto de la mondo ... kaj en la aliaj.

Joël, la 19an de decembro 2023



(fotoj el la reto)

Loka kurso por GEME en St-Genès-de-Lombaud Jen retmesaĝo ricevita la 20an de januaro 2024

Miaj karaj Klodin' kaj Marcelo,

Ni ĝojas pri nia renkontiĝo ĉi-matene kaj ni antaŭĝojas la venontan!
Persone mi tre aprezis viajn komentojn kaj klarigojn, ĝi multe pli facilas kaj rapidas la komprenon.

Vi povas imagi, ke mi havas helpon de retradukisto, sed indas provi komuniki en Esperanto.

Dankon ankaŭ pro la libro, kiun Claudine pruntedonis al Thibault. Ĝi rememorigis min pri alia... montriĝas, ke ĝi estas la sama aŭtoro!

Mi ŝatus veni morgaŭ, sed kun la infanaj agadoj ne estas donita. Ve! Estas domaĝe maltrafi ĉi tiun ŝancon.

Dezirante al vi agrablan semajnfino, saluton al la tuta Pessac-teamo, kaj grandajn kisojn al vi ambaŭ.

Iber.



P.S. Baldaŭ Iberla ne plu bezonos aŭtomatan traduk-helpilon, kiu foje ankaŭ bezonus sekvi kursojn, por eviti gramatikajn erarojn! Trovu ilin!

Marcelo

ESPERANTO-GIRONDE

KUNVENO en Maison de quartier Pessac Bourg en PESSAC

la 10an de marto 2024

de la 10a 30 ĝis la 16a30

Ceeestas: Ĵanseb kaj Annie Brilleaud, Luca Buselli, Elvezio Canonica, Janine kaj Yannick Dumoulin, Hervé Giranton, Katya Gradzion, Dominiko kaj Geneviève Martins, Olivier Moreno, Klodin' Pomiról, Marcelo Redoulez, Bernardo, Rose kaj Maeva Sarlandie, Eric Tiffon, Fernando Torres, Iberla, Jean-François, Thibauld kaj Thimoté Warnier.

Senkulpigataj: Gloria Gargallo, Joël Lajus, Lucienne Laroche, Jean-François Seyler.

Elvezio salutas kaj dankas ĉiujn.

1/ Lingvo-festo en la universitato

Elvezio: Bedaŭrinde ĝi ne okazis ĉijare, sed verŝajne okazos venontan lernojaron.

2/ Aktiveco de Grajneto

Dominiko: Ĉiun kvaran ĵaudon okazas renkontiĝo en Le Petit Grain, asocia trinkejo apud la stacidomo en Bordoza. Kelkfoje venas homoj por informiĝi.



3/ Retejo kaj virtuala biblioteko

Eric: Kiu havas libron povas ĝin proponi kaj se iu ĝin deziras, tiu petas ĝin per la retejo. Tiel oni povas pruntedoni kaj pruntepreni librojn. La posedanto de la petita libro ĝin alportas okaze de la venonta kunveno. Listo de pruntepreneblaj libroj estas disponebla en la retejo.



Klodin': Ni havas multegajn librojn en nia subtegmento, nur mankas tempo kaj fortoj por ilin ordigi.

Marcelo: Inter ili estas tre valoraj malnovaj libroj (ekzemple de Gaston Waringhien, skribdediĉitaj al sia amorantino...)

Eric: La pruntedononto povus verki slipon pri la libro, kiu estus publikigita en la retejo.

Dominiko: Statistikoj pri la vizitoj de la retejo: pli-malpli po unu vizito tage. Cetere la informletero estas publikigita en la retejo. Ĝi celas informi la membrojn de Espéranto-Gironde, kiuj loĝas malproksime kaj ne povas ĉeesti la kunvenojn. Oni povos demandi al la ricevantoj, ĉu ili deziras plu resti en la diskutlisto, aŭ preferas nur la monatan informleteron.

Klodin': Ni ricevis mesaĝon de Jocelyne Monneret, kiu transsendis tiun de Honoré Sebuhoro, afrika esperantisto, kiu laboras pri homaranismo kaj bezonas sep ĉitemajn specifajn librojn.

Luca: Ekzistas retejo miavivo.net, de esperantistoj por esperantistoj. Esperanto-Gironde povus havi grupon en tiu retejo.

4/ Pri la filmo *Nous n'avons pas peur des ruines* de Yannis Youlountas

Marcelo: Mi ĵus verkis tekston titolitan *De fil en aiguille*¹ en kiu mi raportas pri interesa okazaĵo. Origine, Flo sendi mesaĝon al mi por peti, ke mi traduku la subtitolojn de filmo projekciita en januaro en kinejo Utopia *Nous n'avons pas peur des ruines*. La filmo temas pri kvartalo Exarcheia en Ateno, kiu spertas solidaran kaj ribeleman vivsperton. La greka estraro decidis ĉesigi tiun eksperimenton sed organiziĝis rezistado. La celo estas traduki la subtitolojn en Esperanton, kio gravas por la reĝisoro de la filmo. Ni ricevos la definitivajn version de la filmo post kelkaj semajnoj, por labori pri ĝi.

Dua fazo: Je la projekciado en Utopia partoprenis Christian Leduc, kantisto el Loubens, kiu petis, ke iu traduku la subtitolojn de sia kanzonfilmeto *Que sera demain*. Mi min proponis kaj tradukis kun Janine la subtitolojn. Christian publikigis la filmeton *Kia estos morgaŭ*. Christian Leduc kantos en Saint-Macaire la 11an de aprilo je la 15a30, kaj je dato nefiksita en Athénée Libertaire en Bordojo.

Yannick proponas, ke ni verku kanteblan version. Ĉu li kantus ĝin ?

Marcelo: Certe jes: li longtempe estis en rilato kun Isabel Martinez.

5/ Pri Brassens

Yannick: Finfine la afero estas pli-malpli finsolvita kun Flammarion (kiu posedas la rajtojn por du poemoj de Paul Fort). La rajtoj estas tre altaj: Flammarion postulas 50 €, dum Warner, por 21 tekstoj, kaj Universal, por 42 tekstoj, petis po 6 € por ĉiu titolo. Ŝajnas, ke 50 € estas minimuma sumo.

Ni ricevis la permeson de Flammarion, kiu postulis la sendon de tri ekzempleroj. Mi marĉandis, kaj nun ili petas nur unu ekzempleron. Ni atendas la fakturon.

Restas unu titolo: *Heureux qui comme Ulysse*, pri kiu ni ne havas solvon, ĉar ne eblas trovi, kiu posedas la rajtojn. La eldonejo, kiun trovis Martine antaŭ du-jaroj, ŝajne malaperis. Estas do proponite, ke ni publikigu la libron, kaj ni vidos...

Tiu propono estas akceptita.

Porinforme: laŭ la postuloj de Flammarion, la libro devus esti publikigita ĉimonte.



¹ Vi legu la tutan rakonton en venonta numero de LEGI.

6/ Financoj

Yannick: Ni malfermis novan bankokonton en Crédit Agricole de Montendre. Restas 631,33 € sur la malnova konto, kiu estas fermota. 2000 € estis metitaj sur la novan konton el la malnova.

Restas en la bordoza banko la ŝparkonto (3187,66 €) kaj la societaj akcioj (parts sociales: 30 €).

Ni demandos, ĉu eblas konservi tiujn kontojn en Bordoza post la fermo de la ĉeko-konto.

Mi malfermis Paypal-konton, sed ili forprenas komision. Mi malfermis ankaŭ konton ĉe Hello Asso, kie la kroma donaco ne estas deviga.

Ĉekokonto de Montendre: 2137,42 €

7/ Aliaj aferoj

Artikolo el *Der Spiegel*:

Luca: Mi studas la germanan kaj legis en *Der Spiegel* interesan artikolon pri AI, en kiu oni parolas pri Esperanto kaj Zamenhof. Mi estas ĝin tradukanta por komuniki al ĉiuj.

Pri EDE kaj eŭropa baloto – Pri komunikado kaj varbado:

Ĵanseb: Oni devas printi mem la balotilojn el la retejo. Mi baldaŭ ricevos afiŝojn.

Dominiko: Tiu baloto povos esti bona okazo por konigi Esperanton, ekzemple per flugfolioj.

Elvezio: Elisabeth Barbay proponos sian pedagogian valizon dum la SAT-Amikara kongreso en Kvinpetalo. Temas pri materialo por instrui Esperanton al infanoj.

Jean-François: Morine publikigis ludkartarojn (laŭ la sep familioj, kun kelkaj vortoj pri diversaj temoj)

Katya: London aŭ vendredon mi prezentos Esperanton kadre de mia kurso pri la franca lingvo.

Bernardo: Oni povus komuniki pri tio, ke Espéranto-Gironde partoprenas en la Printempo de la Poetoj.

Dominiko: Por la 1a de majo, oni povus ariĝi ĉirkaŭ la banderolo de Espéranto-Gironde.

Marcelo: La problemo estas, ke la banderolo malaperis. Neniu scias, kie ĝi estas.

Dominiko: De multa tempo Espéranto-Gironde organizis nenion por varbi novajn membrojn kaj diskonigi Esperanton. Mi sentas min neutila.

Iberla: Kiam Morine foriris el Créon, ni sentis malkuraĝiĝon, la Esperanto-grupo disfalis. Tamen ni sentas nun pli da kuraĝo dank' al Marcelo kaj Klodin', kiuj venas instrui al ni ĉiumonate.

Jean-François: Dominiko povas anonci la kursojn de GEME en Saint-Genès en la retejo.

Dominiko: Kaj oni povas ankaŭ ilin anonci en LEGI.

Eric: Necesas vivigi la paĝon Facebook, kiun kreis Bernardo.

Jean-François: Ekzemple publikigi fotojn de la kursoj.

Dum la posttagmezo, **Marcelo** proponas, ke ni festu la Printempon de la Poetoj. Li proponas lumbildaron kun poemoj ĉiaspecaj.

Pluraj ĉeestantoj legas poemojn, kiujn ili elektis aŭ verkis:

Rose: Sur la silenta strat' (Raymond Schwartz)

Iberla: Kio estas gracieco (memverkita)

Katya: Kun gracieco – 3 hajkoj memverkitaj

Elvezio: 9 hajkoj memverkitaj

Yannick: Kondamnite (William Auld)

Klodin': poemo de Maksym Kryvtsov, ukraina poeto mortigita dum la nuna milito

Jean-François: poemo memverkita

Marcelo legas la tekston senditan de Joël: Kelkaj paroloj de Ĉefo Seattle.

Bernardo: Karnaval (Raymond Schwartz)

Marcelo legigas poemon de Serge Sire, premiitan en la Beletra konkurso de UEA en 2023: Bilbok-logoj.

Serge deziras, ke La Kompanoj kantu tiun tekston, kiun li skize muzikigis.

Luca: La bela lando; Nura vino stultigas (poemoj de Goethe)

Familio Warnier ludas la rakonton de Luis Sepulveda: *La mevo*

Marcelo: Vivo (Gwangseop Kim) sendita de Park Haesim

Fernando kaj Dominiko kantas *Grândola Vila Morena*, kanzono, kiu donis la signalon por la Revolucio de la Diantoj en 1974.



La kunveno finiĝas je la 16a 30.

La venonta kunveno estos la Ĝenerala Asembleo, la 7an de aprilo, je la 10a30 en Pessac.

Janine

NIAJ KURSOJ

- En **UNIVERSITATO BORDEAUX MONTAIGNE**, en salono C-125, ĉiun mardon de la 17a30 ĝis la 19a, kursojn gvidas Elvezio helpe de Jean-Seb. (06 72 17 22 97)

- En **SAINT-GENÈS DE LOUBÈS**, nun la kursoj okazas laŭ nedifinita horaro, ĉar ni estas tre malmultaj, kaj inter ni estas infanoj. La sekva kurso okazos sabaton la 23-an de marto je la 10a15, ĉe Jean-François kaj Iberla, kun Klodin' kaj Marcelo. Se estos aliaj homoj, ni disponos pri komunuma ĉambro.

Por informiĝi: gemesperanto@gmail.com aŭ 06 60 18 28 66.

LUDO

Krei bildojn dank' al Arta Inteligenteco

Ĉu vi jam uzis la senpagan programon *Bing* por krei bildojn? <https://www.bing.com/images/> Mi spertis ĝin por testi ĝiajn kapablojn. Denove tia programo mirigas sed samtempe entuziasmigas kaj timigas min. Marcelo provis la programon per Esperanto. Tamen ĝi ne bone komprenas la postulojn indikitajn en la internacia lingvo. Sed ĝi tre bone regas la francan. Li do skribis: «Romantiques, deux jeunes, une fille et un garçon, randonnent sur la montagne. Ils portent des sacs à dos sur lesquels on peut voir une étoile verte à cinq branches. Ils parlent espéranto.»

Kaj post dek sekundoj, jen kvar proponoj:

Klodin'



Nur unu bildo pli-malpli respondas al la postuloj. Trovu kiun kaj kial!
La solvoj de ĉiuj ludoj de ĉi-numero aperos en venonta numero de LEGI.

Janine

ESTRARO
de
«ESPÉRANTO-GIRONDE»

* * * * *

Adreso ĉe la prezidanto

* * * * *

Prezidanto: **Elvezio CANONICA**
Université de Bordeaux Montaigne

UFR Langues,

Domaine Universitaire, Esplanade des Antilles,
33600 Pessac

Tel: 06 72 17 22 97 / canonica.elvezio@orange.fr

Sekretariino: **Janine DUMOULIN**

2, chemin des Nauves

Chardes 17130 MONTENDRE

Tel: 05 46 49 07 46 / janinedum@neuf.fr

Kasisto: **Yannick DUMOULIN**

2, chemin des Nauves

Chardes 17130 MONTENDRE

Tel: 06 84 11 26 95 / yannickdum@aol.com

* * * * *

**Kontribuojn por LEGI bv. sendi al janinedum@neuf.fr
aŭ al esperanto.gironde@free.fr**

